
# INFORMILO




# INFORMILO
## pri la 73-a kongreso
### de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio

**Beroun, Ĉeĥio**
**6. 5. – 11. 5. 2022**

OSŽ

České dráhy
Národní dopravce

Cargo

SPRÁVA
ŽELEZNIC

# *Bonvenon en Ĉeĥa respubliko!*

*Ĉeĥa Fervojista Esperanta Asocio r.s. (ĈeFEA) kaj Ĉeĥa Landa Asocio de FISAIC (ĈLA FISAIC) tutkore invitas vin al la 73-a IFEF-kongreso 2022 en Beroun. Urbo Beroun kun sia riĉa historio troviĝas en Meza Bohemio, 35 km okcidente de Prago, facile atingebla per trajno aŭ aŭtomobilo.*

*Ni, organizantoj de la kongreso estas ĝojaj, ke per la kongreso en Beroun ni povas daŭrigi tradicion de organizado de IFEF-kongresoj en Ĉeĥa respubliko (1991 – 43-a IFK Olomouc, 2001 - 53-a IFK Tábor kaj 2011 - 63-a IFK Liberec) kaj disponigi por vi agrablan medion por restado kaj kongresa traktado. La hotelo Grand en Beroun, kiu gastigos nin dum la kongresa semajno estas taŭge ekipita por similaj aranĝoj, kie vi povos ĝui ĉiujn programerojn, loĝadon kaj manĝaĵojn en la sama loko.*

*Samtempe ni volas prezenti al vi belan regionon de Meza Bohemio kun ĝiaj riĉaj naturaj kaj historiaj interesaĵoj. Dum kulturaj programeroj vi povos plene ĝui bonkvalitajn kaj interesajn prezentadojn de lokaj artistoj kaj muzikistoj.*

*Ni esperas, ke la kongreso en Beroun ne trompos viajn atendojn, kaj ke vi rememoros ĝin en viaj kapoj kaj koroj por multaj jaroj.*

*Estu kore bonvenataj en la 73-a IFEF-kongreso en Beroun.*

*LKK*



## Loka kongresa komitato

| | |
|---|---|
| Honora prezidanto | Vladislav Vokoun |
| Prezidanto | Ladislav Kovář |
| Vicprezidanto | Jaroslav Matuška |
| Organizaj aferoj | Ondřej Šmehlík |
| Sekretario, loĝado | Anna Abelovská |
| Financaj aferoj | Michaela Šimková, Jan Kukla |
| Akceptejo | Andrea Švubová |
| Tradukoj | Jindřich Tomíšek |
| Prelegoj | Jaroslav Matuška, Ladislav Hakl |
| Kulturaj programoj | Marie Klumparová |
| Sanasistanto | Alois Klumpar |
| Ekskursoj | Ladislav Kovář, Anna Abelovská |
| Kongreslibro, bulteno | Vít Stanovský, Jindřich Tomíšek, Miroslav Malovec |
| Postkongreso | Ladislav Kovář, Jaroslav Matuška, Ladislav Hakl |

## Adreso de LKK:

Český železničářský esperantský svaz z.s.
Bratří Hubálků 161
CZ 560 02 Česká Třebová
Česká republika
tel.: +420 602 483 265
kongreso@atlas.cz
www.ifef.wz.cz

## Loko de la kongreso:

Hotel Grand Beroun
Nám. M. Poštové 49
CZ 266 01 Beroun – Město
Česká republika
tel.: +420 311 501 501
hotel@grandberoun.cz
www.grandberoun.cz



## Urbo *Beroun*

Reĝa urbo *Beroun* situas ĉe kunfluejo de la rivero *Berounka* kun ĝia dekstraflanka alfluejo *Litavka*, inter du elstaraj ŝirmitaj regionoj *Křivoklátsko* kaj *Český kras* (Ĉeĥa Karsto).

Elstara estas nelonga distanco de la ĉefurbo Prago, sed precipe ĝia situo ĉe la grava trafika direkto al okcidento, la ĉefŝoseo D5, kaj elstara fervoja linio Prago – Pilzeno. Signifon de la urbo mem dokumentas multaj memorobjektoj, ekz. tre bone konservitaj restaĵoj de la mezepoka fortikigo de la urbo kun du pordegoj, Praga kaj Pilzena, preĝejo de *svatý Jakub Větší* (sankta Jakobo pli granda) aŭ grupo de malnovaj urbanaj domoj sur centra *Husovo náměstí* (Placo de Hus).

https://www.mesto-beroun.cz

## Historio de la reĝa urbo *Beroun*



La unua skriba informo pri la urbo *Beroun* devenas de la jaro 1265, kiam ĉeĥa reĝo *Přemysl Otakar II.* aperigis dokumenton por Monaĥejo en *Ostrov*. En ĝi unuafoje aperas latinlingve la nomo *Beroun – Verono*. *Přemysl Otakar II.* determinis fondi sidejon, de kiu aperis la posta urbo *Beroun*, strategie elstara urbo, kiu kreis la malplej longan kaj plej facilan kunligon inter Prago kaj Pilzeno.

Prosperon de la urbo kunportis regado de imperiestro Karolo la Kvara, kiam okazis ankaŭ plivastigo de la metioj. Berounanoj famiĝis kiel drapofaristoj, malt-faristoj, vinberkulturistoj, bierfaristoj, kaj precipe potfaristoj, kies ruĝe kolorigita keramiko ornamita per blankaj naturaj motivoj fariĝis famkonata.

La plej grandan prosperon atingis *Beroun* dum regado de la reĝo *Vladislav Jagellonský*. Detruige influis por evoluo de la urbo brulegoj, dum kiuj ofte estis bruligita plimulto de domoj. Tamen nek superakvegoj kaj epidemioj, nek dum-militaj rabadoj la urbon *Beroun* evitis. La homoj tamen, danke al sia obstineco ĉiam denove sukcesis revivigi sian urbon kaj renovigi ĝian famon.



La reĝa urbo *Beroun* nun estas urbo de industrio, lernejoj, kulturo kaj sporto. Al la turistoj ĝi proponas historiajn memoraĵojn, eblojn de kulturaj kaj sportaj aranĝoj kaj travivaĵoj, kiel ankaŭ ekskursojn en la belan ĉirkaŭan naturon.

## Kongresejo

### Hotelo *Grand Litava* en *Beroun*

Placo de *M. Poštové 49, 260 01 Beroun – Město*




Kvarstela Hotelo *Grand Litava* situas en historia centro de la urbo kaj proponas *à la carte* restoracion, *fitness*-centron kaj *WI-FI* konekton senpagan.

En la ĉambroj proviĝas sidlokoj kaj satelita televidilo, sekurŝranko, minilikvorŝranko kaj banejo kun harsekigilo. Senbariera alveno en la hotelon.

La hotelo situas 21 km de flughaveno de *Václav Havel Praha* kaj de ĉi tie eblas atingi aŭtomobile la hotelon sur grandrapida ŝoseo D5 en 15 minutoj. La Hotelo *Grand* proponas deponon de la valizoj, senpagan parkadon, kaj subteran parkadon laŭ peto kun plipago. La gastoj laŭ peto povas pruntepreni biciklojn. En la hotelo eblas ŝanĝi monon.

Je dispono estas granda salono kaj konferencaj salonetoj por 24 ĝis 200 personoj, restoracio, bierejo, *Lobby bar, Fitness, WI-FI* kontakto. En proksimeco de la hotelo situas tenis-ludejoj, futbal-ludejo, akvoparko kaj *fitness*. Manĝigado estas ebla en hotela restoracio aŭ en proksimaj restoracioj.

www.grandberoun.cz

## Vidindaĵoj de *Beroun* – duontaga ekskurso D1





Historia centro en *Beroun* estis proklamita la 10-an de septembro 1992 kiel urba memoraĵo.



Konstruaĵo de **Berouna urbodomo** formas dominanton de *Husovo náměstí* (Placo de Hus). Ĝia nuntempa pseŭdobaroka formo devenas de la jaro 1903. En ĝia korto estas bela atrio kun historia puto meze kaj stilaj arkadoj. Unu el plej efikaspektaj partoj de la urbodomo estas ceremonia salono kun interesa plafono kaj kun statuoj kaj riĉaj ornamaĵoj, en kiuj ĉefaj motivoj estas trilobitoj, prezentantaj la plej ofte troviĝantaj fosiliojn en ĉirkaŭaĵo de *Beroun*.

**Praga pordego** *(Pražská brána)* aperis dum ŝanĝiĝo de 13-a kaj 14-a jarcento rekte vid-al-vide origina travadejo trans la riveron. Ĝia ĉefa celo estis ŝirmi eniron en la urbon kaj samtempe servi kiel observejo.

**Pilzena pordego** *(Plzeňská brána)* estas evidente la plej malnova parto de la urba fortikigo, sian gotikan aspekton ĝi tamen ne konservis. Post detruiga brulego en la jaro 1735 ĝi estis riparita en baroka stilo. Tra tiu ĉi pordego iris komerca vojo de Prago al Pilzeno, kaj estis ĉi tie enkasigata ĝis la jaro 1752 dogano.

**Berouna remparzono** estas unu el la plej bone konservitaj muregaj sistemoj en Bohemio kaj havas sian neanstataŭeblan lokon ankaŭ en la pli vasta mezeŭropa spaco. Ĝi estis konstruita laŭ iniciato de la reĝo Venceslao la Dua fine de 13-a kaj komence de 14-a jarcento, kiam la muregoj estis ses ĝis naŭ metroj altaj, ĝis du metroj dikaj, kaj en ili estis enkonstruitaj 37 bastionoj.

**Placo de Hus** formas naturan centron de la urbo. Post detrua superakvego en aŭgusto 2002 ĝi estis komplete riparita, dum kio esprimoplene ŝanĝiĝis ĝia aspekto. Elstaris riparitaj fasadoj de la domoj kaj antikveco de la historia urbocentro, kiun emfazis stilaj objektoj.



Urbo *Beroun* havas en sia blazono kaj sur sia flago simbolon de la urso. Nun eblas vidi vivajn ursojn en ursa ĝardeno sur **Urba monto** *(Městská hora)* kie troviĝas ankaŭ vidaĵturo kun belegaj rigardoj al la urbo.

## Vitrofandejo *Nižbor* – duontaga ekskurso D2



Vitrofandejo en *Nižbor* situas en Mezbohemia regiono, en pentrinda valo de la rivero *Berounka*.

Familia vitrofandejo *Rückl* estas sinonimo de la unuaklasa polurita kristalvitro ekde la jaro 1846 kaj ekde tiu ĉi tempo ĝi ŝovas tradician ĉeĥan vitroarton al nova nivelo.

https://www.ruckl.com

## Centra regadejo *Praha* - Faka ekskurso F



Laborejo, (ekfunkciigita en la jaro 2016) havas sidejon en kvinetaĝa konstruaĵo. En la tri plej supraj etaĝoj troviĝas plej-parte trafikaj direktosalonoj kaj salono por instruado de estontaj trajntrafikaj direktistoj. Trajntrafikistoj direktas fervojan trafikon sur fervojaj linioj *Česká Třebová – Kolín (*krom stacioj *Česká Třebová, Brandýs nad Orlicí* kaj *Pardubice), Olbramovice – Praha, Kolín – Kralupy n. Vltavou.*

## *Křivoklát, Lužná u Rakovníka* – Tuttaga ekskurso T

### Kastelo *Křivoklát*



*Křivoklát* estas unu el la plej malnovaj kaj plej signifaj kasteloj de ĉeĥaj princoj kaj reĝoj.

Ĝia historio komencis jam en 12-a jarcento. Dum regado de la reĝo *Přemysl Otakar II.* estis konstruita vasta, grandioza, reĝa burgo, en kiu jam ekde infanaĝo kaj denove en maturaĝo restadis Karolo la Kvara. La burgo pli poste estis karakterize trakonstruigita fare de la reĝo *Václav IV*. Pli poste la burgon grandstile finkonstruigis kiel fortikigitan kastelon la reĝo *Vladislav Jagellonský*. La kastelo *Křivoklát* estis kelkfoje grave difektita de brulegoj.

https://www.hrad-krivoklat.cz

## Fervoja muzeo de Ĉeĥaj Fervojoj en *Lužná u Rakovníka*



Muzeo troviĝas en spacoj de iama hejtadejo, apartenanta al Kompanio de *Buštěhradská* fervojo *Lužná – Lišany*, kies estiĝo estas datita de la jaro 1871. La hejtigejo dum sia ekspluatado estis kelkfoje trakonstruita kaj lasta granda rekonstruo okazis en jaro 1924, kiam samtempe ĝi venis en posedadon de Ĉeĥoslovaka ŝtato.

La plej intensa ŝanĝo estis konstruo de nova halo por riparoj de dizellokomotivoj komence de 1980-aj jaroj, pro kiu devis esti malkonstruitaj iuj jam historiaj objektoj, ekzemple muntejo de vaporlokomotivoj. Pli granda parto de la origina hejtadejo restis konservita, inkluzive de teknologia aranĝo por ekspluatado de vapora trakcio.

http://www.cdmuzeum.cz/

---

# Postkongreso

## Postkongreso en *Pardubice*



Pardubice estas agrabla urbo sur ebenaĵo ĉe la rivero Elbo *(Labe)*. La urbo post granda prosperado en 15-a jarcento malprogresis post tridekjara milito (1618-1648), kaj stagnis 200 jarojn ĝis la tempo, kiam ĝin atingis konstruado de la fervojo (1845). Kun la fervojo venis ĝenerala, ne nur industria progresa evoluo, kiu daŭras ĝis nun.

Sed *Pardubice* ne estas nur industria urbo kaj trafika nodo. En ĝia centro konserviĝis unika historia komplekso, kiu konsistas el malnova urboparto kaj kastelo, kiuj estis konstruitaj precipe en du epokoj – en gotika kaj renesanca. Fortikigon de la urbo kompletigas burgo *Kunětická hora* (*Kunětická* monto), situanta sur ununura, de malproksime videbla monto.

https://www.pardubice.eu/

## Postkongresa ekskurso al *Litomyšl*



*Litomyšl* estas elstara historia urbo en regiono Pardubice en orienta Bohemio. Komencon de ĝia historio ni trovas en 12-a jarcento. En 19-a jarcento *Litomyšl* fariĝas centro de societa vivo, klereco kaj artoj. En la jaro 1824 ĉi tie naskiĝis muzika komponisto *Bedřich Smetana*, plue pentristo *Julius Mařák* (1832), aktivis ĉi tie elstaraj personoj – verkistoj *Božena Němcová* kaj *Alois Jirásek*.

En areo de renesanca kastelo, konstruita en la jaroj 1568-1581, kiu estis en la jaro 1999 enskribita en nomaron de la monda kultura heredaĵo UNESCO, estas organizata ĉiujare ekde 1949 famkonata Internacia opera festivalo *Litomyšl* de *Smetana*.

*Smetana* placo en *Litomyšl* estas ĉirkaŭita de multaj historiaj domoj kun tute konservita arkaro sur ambaŭ flankoj. Interesa estas domo *U Rytířů* (Ĉe Kavaliroj) – renesanca konstruaĵo kun riĉe ornamita ŝtona fasado el jaro 1550.

https://www.litomysl.cz/

## Postkongresa ekskurso al *Svitavy*



Urbo *Svitavy* situas en limregiono de Bohemio kaj Moravio kaj ĝia historio komencas en duono de la 12-a jarcento. El origina vilaĝo ĝi iom-post-iome transformiĝis al elstara urbo. Ĝia plej granda kresko venis en 19-a jarcento, kiam tra teritorio de la urbo estis konstruita fervoja linio, kunliganta urbojn *Brno* kaj *Česká Třebová* kun Prago. En tiu ĉi



tempo ĉi tie komune vivis germanoj, ĉeĥoj kaj hebreoj. Naciecaj disputoj kulminis dum la 2-a mondmilito. Poste la urbon loĝigis ĉeĥaj familioj el diversaj partoj de la respubliko.

El tempoj de ĉeĥagermana kunekzistado en la urbo konserviĝis tielnomata *Ottendorfa domo*, kiu estis konstruita el financaj donacoj de la samurbano de *Svitavy*, entreprenisto *Oswald Ottendorf,* kiel publika biblioteko kaj legejo por germana kaj ĉeĥa loĝantaro. En tiu ĉi domo nun troviĝas ankaŭ Muzeo de Esperanto.

https://www.svitavy.cz/

## Postkongresa eksurso al *Hradec Králové, Třebechovice pod Orebem*

### Muzeo de sekuriga kaj komunikada tekniko *Hradec Králové*

La plej malnova kaj en Meza Eŭropo unika kolekto de historia fervoja komunika kaj sekuriga tekniko situas en *Hradec Králové* (areo de la kompanio *Signal Mont s. r. o.*) kaj ĝia filio en fervoja stacio *Děčín hl. n.* La ambaŭ ekspoziciojn ekspluatas Teknika centra oficejo de trafika vojo, subigita al Administrado de la fervojoj, ŝtata organizo.



https://www.tudc.cz/index.php/muzeum/

## Tendaro de Jan Ámos Komenský



Tendaro en *Běleč* estis fondita en la jaro 1929. Ĝi aperis kiel pure somera tendaro kun deziro krei spacon por kunestado de junularo. Ni ĉi tie tagmanĝos kaj ĝuos trankvilan atmosferon meze de bela naturo.

https://taborbelec.cz

## Muzeo de betlehemoj en *Třebechovice*







Muzeo de betlehemoj en *Třebechovice* en siaj kolektoj havas pli ol 400 betlehemoj, konstruitaj el plej diversaj materialoj kaj devenantaj el la tuta Ĉeĥa respubliko. La plej valora kaj plej admirata estas unika mekanika *„Třebechovický Proboštův betlém“*, konstruita fare de popolaj lignoskulptistoj *Josef Probošt, Josef Kapucián* kaj *Josef Friml*. Krom *Probošta* betlehemo la muzeo proponas ankaŭ grandan vitran betlehemon, kies partojn ricevis la papo *Pius XII.* aŭ urbestro de la kanada Montrealo.

https://betlem.cz



Stacidomo *Beroun*


Stacidoma halo


Preĝejo de sankta Jakobo pli granda


Panoramo de la urbo de nordokcidento

# Urbo *BEROUN*




1 - Stacidomo *Beroun*

2 - Hotelo *Grand Litava*

3 - Urba monto



PRAHA
Roztoky
Kladno
Buštěhrad
Libušín
Stochov
Tuchlovice
Lány
Velké Přilepy
Hostivice
Unhošť
Rudná
Dřevčice
Mochov
Úvaly
Přišim
Škvorec
Říčany
Průhonice
Jesenice
Dolní Břežany
Černošice
Dobřichovice
Řevnice
Jíloviště
Mnichovice
Velké Popovice
Kamenice
Jílové u Prahy
Pyšely
Davle
Hradištko
Krhanice
Křňany
Čisovice
Líšnice
Mníšek pod Brdy
Nová Ves pod Pleší
Kytín
Jistevník
605
Liteň
Beroun
Berounka
Králův Dvůr
Zdice
Žebrák
Lochovice
Broumy
Kublov
Krušná hora
609
Zbečno
Roztoky
Chyňava
Nižbor
Hýskov
Loděnice
Sázava
Poříčí nad Sázavou
Čerčany